

Allogaj prelegoj, interesaj ekskursoj kaj profundaj diskutoj

171 gastoj el 23 landoj partoprenis en la 24a PSI en Waldfischbach-Burgalben

PSI (Printempa Semajno Internacia) fariĝas pli kaj pli internacia. Ĉi-jare pli ol la duono de la 171 partoprenantoj venis el eksterlando. Kreskas ankaŭ la procentaĵo de junaj gastoj. Triono de la partoprenantoj estis infanoj aŭ junuloj.

De Alfred Schubert

Inter la 171 partoprenantoj estis laŭ Marika Frense kaj Lars Sözüer, kiuj laboris en la organiza teamo, pli ol 60 infanoj kaj junuloj, kiuj grandparte mem zorgis pri la infana kaj junulara programo. La plej granda programero estis la prezento de la teatraĵo *La eta princo* laŭ Antoine de Saint-Exupéry sub la gvido de Christoph Frank. Partoprenis en ĝi pli ol la duono de la infanoj kaj junuloj. *Esperanto aktuell* raportos en venonta numero pri la teatraĵo.

La organiza teamo – la familioj Gersonde, Frense, Brücker/Sözüer, Böhm, Klünder kaj Rosenstock – faris bonan laboron. Ili prezentis buntan programon. Antaŭtagmeze la gastoj ofte povis elekti inter sep programeroj, kiuj okazis samtempe. Prelegoj pri kaktonomio, sunsistemo, alternativaj energioj kaj multaj aliaj aferoj allogis. Dum la posttagmezoj okazis ekskursoj. Oni vizitis interalie strutobredejon, la plej grandan ŝumuzeon en la mondo, la kaktolandon Steinfeld, la faman urbon Speyer kun imperiestra katedralo, teknika kaj historia muzeoj. En Kaiserslautern oni vizitis novan Esperanto-grupon, en Pirmasens la teknikan muzeon Dynamikum, kie eblis mem fari pli ol 150 eksperimentojn, kaj ĉokoladofabrikon. Same interesaj estis la vesperaj programoj: paska fajro en la korto de la preĝejo, vinseminario, internacia kaj muzika vesperoj venigis multajn gas-



Esperanto estas lingvo por konatiĝi kun homoj: Rob Keetlaer (3a de dekstre, ludante kartan ludon kun partoprenantinoj) ŝatas la amikan etoson de PSI.

tojn. Post la vesperaj programeroj la PSI-anoj renkontiĝis en la „nigra truo“, la knajpo, en kiu la etosoplena Esperanto-vivo daŭris ĝis la frua mateno. Ne nur la bunta programo allogis. Estis ankaŭ aliaj kaŭzoj. Zdzisław Glajcar, kiu eklernis Esperanton antaŭ 72 jaroj kaj dum longa tempo aktivas en Esperanto-movado en Pollando, diris ke por li plej gravas renkonti interesajn

homojn. Li serĉas longajn profundajn diskutojn kun fakuloj, kiuj interesiĝas pri la ekstermovada apliko de Esperanto. Kaj li trovis kelkajn en PSI. Dum la pasintaj 23 jaroj PSI fariĝis aranĝo konata ne nur en Germanio, sed vere internacie. Ĉi-jare multe pli ol la duono de la partoprenantoj venis el eksterlando, kvar gastoj eĉ el Japanio.

PSI mallonge

Pozitive:

- + komforta domo
- + multaj kaj bone ekipitaj prelegejoj
- + bongustaj manĝaĵoj
- + multflanka programo
- + interesaj homoj
- + internacia etoso
- + akceptebla prezo

Negative:

- Inter la 20 bieroj en la knajpo ne estis bavara senalkohola tritika biero.

Resume:

PSI estas rekomendinda renkontiĝo – ne nur por familioj.



Wolfgang Bohr prelegis pri nomoj de „kaktoj kaj aliaj sukulentaj plantoj“.

16 vinoj dum du horoj

Anton Kiefer informis pri la produktado de vinoj

La salono estis plena kiam Anton Kiefer, vinkultivisto el Edenkoben, prelegis pri la historio de la vino kaj la nunaj reguloj pri vinproduktado. Por ne fari tro sekan prelegon Kiefer prezentis 16 el siaj vinoj por gustumi. La 50 vingustumantoj tre aktive partoprenis en tiu gustumado kaj la aranĝo iom post iom fariĝis pli paroliga ol paroliga kurso. Ĉu la gastoj nur parolis la veron – kiu laŭdire troviĝas en la vino – ne estis kontrolebla. Ĉiukaze: vere estis agrabla vespero.



Post la vinseminario Wolfgang Bohr (meze) kaj Jörg Gersonde (dekstre) dankis al Anton Kiefer kaj prezentis al li T-ĉemizon kun PSI-emblemo. Fotoj: Schubert

Internacia vinkultura Domo de Anton Kiefer



Sur la etiketoj de la vinoj de Anton Kiefer el Edenkoben legeblas „Internacia vinkultura Domo“.

Historio de PSI

La unua PSI okazis en 1985 en Bielefeld. Partoprenis 35 gastoj. Dek jarojn poste kunvenis en Waldfischbach-Burgalben 111 gastoj. En la jaro 2005 estis 122 en Mücke. Ĉi-jare venis 171 gastoj al Waldfischbach-Burgalben. La jubilea 25a PSI okazos en St. Andreasberg en Harcmontaro. La meza jara kresko de la partoprenantaro de PSI dum sia 23-jara historio estis 7-procenta.

Statistiko pri la 24a PSI

Partoprenis 171 gastoj. 78 venis el Germanio, 29 el Belgio, dek el Ukrainio, po ses el Litovio kaj Francio, po kvin el Finnlando, Hungario, Norvegio kaj Svislando, po kvar el Japanio kaj Luksemburgio, po du el Kroatio, Nederlando, Pollando, Italio kaj Aŭstrio, po unu el Kanado, Danlando, Alĝerio, Katalunio, Ĉeĥio, Vjetnamio kaj Bulgario.

La partoprenantoj diras ...

Thomas Demeyere:

„Mi estas 8-jara denaskulo. Tio estas mia naŭa PSI. Mi havas ok amikojn ĉi-tie kaj volas reveni venontjare. PSI tre plaĉas al mi krom ke estas multaj homoj kiuj ankoraŭ ne bone parolas Esperanton.“



Kara Thomas, ne ĉiuj estas feliĉaj denaskuloj. Sed ili dum PSI multe lernas kaj venontfoje ili certe jam pli bone parolas Esperanton. Vi vidos.

Alfred

Christelle Rottier:

„Mi komencis lerni Esperanton en oktobro 2007. Tio estas mia unua internacia renkontiĝo. Mi venis por multe paroli kaj lerni Esperanton. Mi intencas reveni al venonta PSI.“



Margarete Klünder:

Mi estas denaskulino. Mi komencis lerni en 1914. Mia unua lingvo estis Esperanto kaj poste mi lernis la germanan. Plaĉas al mi esti inter la junaj Esperantistoj en PSI kaj mi ofte miras kiel flue ili parolas la lingvon.“



Rob Keetlaer:

„Mi estas daŭra gasto ekde 2002. Plaĉas al mi la amika etoso kaj la bona programo. Supozeble mi revenos.“

(rim. d. l. red.: Pro pli interesa okupo (vidu la foton paĝo 4, supre) Rob Keetlaer ne havis tempon por fari portretan foton.)

El la estraro de

Germana Esperanto-Asocio

La 1an de marto 2008 la estraro de Germana Esperanto-Asocio (GEA) kunvenis en la Esperanto-urbo Herzberg, inter alie por inspekti la urbon, kiu antaŭvideble gastigos la 86an Germanan Esperanto-Kongreson kune kun la Eŭropa Esperanto-Kongreso. La lasta jam komenciĝos vendrede, la 9an de majo. Tio estas kompreneble la antaŭ-Pentekosta vendredo kaj ne la antaŭ-Paska, kiel mi erare skribis en la lasta raporto.

Hotelo „Goldener Hirsch“ („Ora Cervo“): Riĉa aktivulo serĉata

La estraro vizitis la hotelon, kiun oni vendas inkluzive grandan areon por malalta sumo (ĉ. 80.000 €). Parte ĝi estas renovigenda, sed el ĝi povus ekiĝi bona malgranda Esperanto-klerigejo, kun 20 litoj, kompleta gastejo, du grandaj salonoj kaj du loĝejoj. Kompreneble la plej granda problemo ne estas la aĉeto, sed la posta mastrumado. Se eble monhava rentulo aĉetus ĝin, ĉar li tie vidus por si ŝancon, ekloĝi en tiu Centro kaj gvidi ĝin (en financa ekvilibro), simile al la kastelo Gresillon kaj aliaj Esperanto-entreprenejoj, tiam tio estus tre sukcespromesa ŝanco por la Esperanto-aktivado en tuta Germanujo. GEA mem povus laŭ siaj fortoj kontribui, sed nek aĉeti nek mastrumadi la domon.

Inform-portalo www.esperanto.info

La estraro kunlaboras kun Judith Meyer und Chuck Smith, kreintoj de inform-portalo www.esperanto.info. Ĝi entenu en multaj lingvoj ĝeneralajn informojn pri Esperanto. GEA kunzorgas por la Germana versio. Per tiu portalo eblas eviti, ke ĉiu Esperanto-organizo prezentu la samajn informojn, parte en pli-malpli mallerta maniero. Danke al la ekzisto de tia centra portalo ĉiu povos estonte simple meti koncernajn ligilojn sur sian paĝon. Enhave mankas ankoraŭ multo. Kontribuojn oni povas sendi al la GEA-prezidanto, kiu posedas administrajn rajtojn. La du kreintoj meritas multan dankon pro sia iniciate-mo.

Posteulo por la trezoristo Pit Hauge trovita

La plej bona novaĵo estis la deklaro de Andreas Diemel, ĝis nun reprezentanto de Germana Esperanto-Junularo, resti en la GEA-estraro kaj eĉ transpreni la postenon de trezoristo ekde 2009. Ĝis tiam li havos tempon, lasi sin enkonduki en sian fakon. La tuta estraro esperas, ke Andreas Diemel estos nur unua indiko de tre aprezinda evoluo, ke iom post iom la juna generacio transprenas taskojn kaj respondecon ene de GEA.

Honorigoj

La estraro pritraktis plurajn proponojn de honoriga dokumento, kiujn liveris Julika Rosenstock. Krome oni fiksas detalojn: Tian dokumenton estonte transdonos la prezidanto kadre de la Germana Esperanto-Kongreso okaze de la 25a, 40a aŭ 50a jaro de membreco. Gratulajn leterojn ricevos estonte la ordinarnaj membroj okaze de la 50a aŭ 75a datreveno de sia naskiĝo (kaj poste ĉiun kvinan jaron).

Nova sistemo iDiS

La unua ŝtupo de la nova sistemo iDiS por diversaj servoj de membroj kaj interesatoj povis esti elprovata meze de marto. Necesos ankoraŭ multa laboro, ĝis la lokaj grupoj kaj landaj ligoj povos uzi ĝin. Sekvas nun la paŝo prepari la ĉ. 6.000 adresojn al transdono. Verŝajne restos nur ĉ. 2.000, ĉar GEA intencas streki ĉiujn nur „surpaperajn membrojn“. Post la membroadministrado sekvos la nov-organizo de la financa administrado, kio ĉefe helpu la trezoriston.

85a Germana Esperanto-Kongreso en Essen

Ĝis komence de marto aliĝis nur 61 partoprenantoj. Estas tre bedaŭrinda, sed konata fenomeno, ke aliĝoj al Esperanto-aranĝoj okazadas nur tre malfrue, kio ĉiam maltrankviligas la organizantojn. Eble ankaŭ la urbo mem ne estas tiom alloga por turismemuloj, sed la programo estas samkvalita kiel dum la pasintaj jaroj, kaj kongreso ja ankaŭ celas, plani kaj kunordigi la laboron

de la venontaj jaroj. La inform- kaj aliĝ-paĝoj, lerte kreitaj de Lars Sözüer, funkcias ekde la 13a de marto, en ambaŭ lingvoj. http://www.esperanto.de/gek/index_de.php. Ekzistas ankaŭ la listo de la partoprenantoj: <http://www.esperanto.de/gea/Essen.html>

Novaj varbiloj de GEA

Ĝis komence de marto la versioj 1 (bazaj informoj) kaj 4 (Esperanto-kulturo) estis pretaj kaj jam uzataj dum la foiro *didacta* februare en Stuttgart. La ceteraj versioj devus same esti pretaj, kiam tiu ĉi eldono de *Esperanto aktuell* aperas. Por disdono zorgas la vicprezidanto Andreas Emmerich. Al li oni sendu restintan stokon de antaŭaj informiloj kaj tiam senpage ricevos novan materialon (kp. *Esperanto aktuell* 2008/1, paĝo 2). Vidu la apartan informon pri versioj kaj stoko. La estrarano Sebastian Kirf dankinde zorgos por la dezajno de pliaj informiloj.

Martin Schäffer UEA-komisiito de GEA

La ĝenerala sekretario de GEA, Martin Schäffer, nun estas ankaŭ UEA-komisiito de GEA. Li krome oficas kun d-ro Ulrich Lins kiel Germana A-komitato dum la Universalaj Kongresoj. GEA kiel unu el la plej grandaj landaj ligoj de UEA volas estonte ludi pli gravan rolon kaj helpe de sia komisiito plifortigi la kunlaboron.

Rudolf Fischer

Neue Faltblätter

Wie bereits berichtet, haben Andreas Emmerich und Sebastian Kirf unter Mitwirkung einiger anderer die neuen Faltblätter entwickelt, mit denen für den Deutschen Esperanto-Bund, aber auch für die Nachbarverbände in Österreich und der Schweiz sowie für die Deutsche Esperanto-Jugend gewonnen werden soll. Gedacht sind sie zum Verteilen an Interessierte bei Informationsständen, Messen und sonstigen Gelegenheiten der Massenwerbung. Sie eignen sich weniger zum Einzelversand an Interessierte.

Hier eine Übersicht über Inhalte und Auflagen: Faltblatt 1: Generelle Informationen, 5.000 Stück (abrufbar); Faltblatt 2: Was kann man mit Esperanto machen? (Nutzen), 2.500 Stück; Faltblatt 3: Reisen mit Esperanto (Pasporta Servo, usw.), 2.500 Stück; Faltblatt 4: Esperanto – die Kultursprache, 2.500 Stück (abrufbar); Faltblatt 5a: Aufbau der Sprache (für Nichtfachleute), 2.500 Stück; Faltblatt 5b: Aufbau der Sprache (für sprachlich Gebildete), 2.500 Stück; Faltblatt 6: Esperanto und Sprachpolitik, 2.500 Stück.

Die Serie ist eine Probeauflage. Es soll abgewartet werden, wie das Echo ist, sowohl bei den Aktiven, die die Faltblätter verteilen, als auch beim Publikum. Weitere Ausgaben zu anderen speziellen Themen sind denkbar.

Ziel ist, die Interessierten auf unsere Netzseiten zu verweisen, auf denen sich ja weitere Information befindet. Trotzdem brauchen wir auch „Werbe-material der 2. Stufe“, also Druckwerke, die sich Einzelthemen ausführlicher widmen. Darüber hinaus kann man sich an unseren Generalsekretär Martin Schäffer wenden, der die Anfragen beantwortet oder an die richtigen Zuständigen weitergibt.

Die Faltblätter können im Austausch gegen älteres Material angefordert werden bei: Andreas Emmerich, Hauptstraße 42, 64753 Brombachtal

Rudolf Fischer

Plakat

von Dirk-Werner Hartmann

Der letzten Ausgabe von *Esperanto aktuell* war ein Plakat im DIN A 3-Format beigeheftet, das anlässlich des Internationalen Jahres der Sprachen vom D.E.B. herausgegeben wurde. Unter dem Druck der Termine unterblieb es bisher, den Namen des Autors zu nennen, der dem D.E.B. den Entwurf des Plakates kostenlos zur Verfügung gestellt hat. Es ist Dirk-Werner Hartmann aus Kaiserslautern, der jüngst dort eine neue Esperanto-Gruppe gegründet hat. Hiermit bedankt sich der D.E.B.-Vorstand herzlich bei ihm.

Rudolf Fischer

Erfolgreiche Aktion

„Mäzen sucht Mäzene“

Die Aktion „Mäzen sucht Mäzene“ war ein voller Erfolg und übertraf die Erwartungen. Der D.E.B. hat damit eine gute finanzielle Basis für die Einrichtung einer Geschäftsstelle in Berlin. Der Stand der Spenderliste, die nach Eingang des Betrages von 500 EUR geordnet ist, sah bis Ende Februar wie folgt aus: 1) Andreas Emmerich, 2) Karl aus Germering, 3) Esperanto-Klub München e.V., 4) Josef Fischer, 5) Prof. Dr. Martin Haase, 6) Dr. Reinhard Fößmeier, 7) (Name bekannt), 8) (will anonym bleiben), 9) Dr. Klaus Schlüter, 10) Prof. Dr. Horst Kaufmann, 11) (will anonym bleiben), 12) Dirk Kretschmann, 13) Albrecht Kronenberger, 14) (will anonym bleiben), 15) (Name bekannt), 16) Esperantofreund aus Köln, 17) Helmut Klünder, 18) Dr. Wolfgang Schwanzner, 19) Gunnar Fischer, 20) Ralf Köhne, 21) Thomas Bormann, 22) (will anonym bleiben), 23) Esperanto-Haus Michendorf e.V., 24) Esperanto-Gruppe Nürnberg e.V., 25) Esperanto-Gruppe Bremen

Die Esperanto-Gruppe Bremen hat sogar noch eine weitere Spende im Sommer angekündigt. Im Namen des gesamten Vorstandes bedanke ich mich ganz herzlich bei den Spendern und werde berichten, wofür genau diese Zielspenden nach Fertigstellung des Esperanto-Hauses in Berlin verwendet wurden.

Dr. Rudolf Fischer

Vorsitzender des D.E.B.

Schutzfunktion des Esperanto

Zum Internationalen Tag der Muttersprache weist der Deutsche Esperanto-Bund auf die Schutzfunktion einer neutralen Verkehrssprache hin. „Wer die Sprachenvielfalt und das Recht auf Muttersprache unterstützt, muss für die internationale Verständigung eine Sprache verwenden, die ihren Sprechern nicht eine spezielle nationale Kultur und Identität überstülpt.“ so der Bundesvorsitzende Dr. Rudolf Fischer, Universität Münster. Seiner Meinung nach ist die Plansprache Esperanto, die

in über 100 Ländern der Erde Sprecher hat, eine ideale Lösung. Sie ermögliche Einheit in der Vielfalt, bei der jeder in Augenhöhe mit dem anderen international kommunizieren könne. Damit entginge man der Gefahr, der Anziehungskraft der Sprache einer politisch und wirtschaftlich mächtigen einzelnen Nation zu erliegen und nach und nach die eigene Muttersprache aufzugeben. Der Internationale Tag der Muttersprache ist ein von der UNESCO ausgerufenen Gedenktag zur „Förderung sprachlicher und kultureller Vielfalt und Mehrsprachigkeit“. Er wird seit dem Jahr 2000 jährlich am 21. Februar begangen.

Pressemitteilung des D.E.B.

EU financos

peresperantan tradukprojekton

La Eŭropa Komisiono aprobis tradukprojekton de infanlibroj, en kiu Esperanto rolas kiel pontolingvo. EU financos per 64 000 eŭroj la projekton, en kiu infanlibroj pere de Esperanto estos tradukitaj inter la bengala, itala, slovena kaj kroata lingvoj, kaj poste distribuitaj en elementaj lernejoj.

La eldonprojekto, kiun ellaboris Zlatko Tišljarić, kaj en kiu partoprenos Edistudio el Pisa (Italio), Inter-kulturo el Maribor (Slovenio) kaj barata eldonasocio Samatat Siksha-Samatat Prakashan el Kalkato estis aprobita de kulturfonduso de Eŭropa Komisiono.

laŭ: ret-info

sendis: Rudolf Fischer

Antaŭkongresa semajno en Herzberg - la Esperanto-urbo

Inter la 11a kaj 19a de julio antaŭ la UK en Rotterdamo ni invitas vin sperti interesan Kulturturisman Semajnon en Herzberg – la Esperanto-urbo. Atendos vin komunaj ekskursoj, kulturaj prezentadoj kaj multaj vidindaĵoj. Vi havos varian programon kaj spertos la vivon en la Esperanto-urbo Herzberg. Post la antaŭkongresa semajno ni organizos komunan veturadon al Rotterdamo. Informojn vi trovos ĉe www.herzberg.de de kaj <http://esperanto-urbo.de>.

ICH

Sukcesa Esperanto-kurso en Munkeno

Je la semajnfino 9.2./10.2.2008 la Munkenanoj organizis dutagan kurson en la EineWeltHaus (unu-mondo-domo).



Zsófia Kóródy (en la mezo) kun parto de la lernantoj en Munkeno. F: Karl Breuninger

Partoprenis 12 interesuloj, kiuj ĝis tiam sciis preskaŭ nenion pri Esperanto. La taskon de instruado transprenis Zsófia Kóródy el Herzberg. Ŝi hazarde traveturis je tiu semajnfino Munkenon, kaj ni kaptis la ŝancon prezenti spertan instruistinon. Ŝi entuziasmigis la interesulojn tiel bone, ke tuj kvar membriĝis en nia klubo. Ili tiel interalie ŝparis la kurskotizojn. Zsófia Kóródy ankaŭ estis intervjuita de televidteamo kaj la filmeton vi povis rigardi je la 17a de februaro en ARD. La fundamento de tiu neatendita intereso pri la kurso estis informvespero komence de januaro en la popolaltlernejo en Munkeno. Tien venis preskaŭ 15 personoj, kiuj eĉ devis pagi 5 eŭrojn por la tre bona informado de nia nova aktivulo Norbert Gütter. Li dum preskaŭ unu jaro diskutis kun la prizorgantino de la popolaltlernejo kaj nun ŝi ŝajne estas konvinkita kaj estas malferma por la planado de nova informado-vespero. *Karl Breuninger*

Sprachklub Augsburg in neuen Räumen

Ab Juni 2008 trifft sich der Esperanto-Sprachklub Augsburg im „Bürgertreff Hochzoll“, Neuschwansteinstraße 23, jeden 1. Mittwoch im Monat ab 17 Uhr. Am 4. Juni steht „100 Jahre Deutsches Esperanto-Institut – neue Initiativen“, am 7. Juli ein „Senkrokodila vespero“ mit Sprachübungen auf dem Programm. Für das Dachterrassenfest am 26. Juli wird um Anmeldung gebeten.

Steffi kaj Ĝeraldo Tucker

Federacia Meritkruco por prof. Rokuro Makabe

Germana Esperanto-Asocio (GEA) fieras pro sia membro prof. d-ro Rokuro Makabe el Dreieich, aktivulo de la Esperanto-Societo Frankfurt/Main, kiu ricevis la 26an de februaro la Federacian Meritkrucon.



Transdonis ĝin la Heslanda ministro por Federaciaj kaj Eŭropaj Aferoj, Volker Hoff.

Prof. Makabe lernis Esperanton jam en 1950 kiel junulo kaj aliĝis al GEA en 1983. Tial GEA krome kore gratulas al li ankaŭ pro la 25-jara jubileo de lia membriĝo kaj deziras al li ankoraŭ multajn jarojn en sano kaj kontento.

Rudolf Fischer



Norbert Karbe laŭreato

Dum solena akcepto ĉe urbestro de Pirna la 4an de januaro 2008 Norbert Karbe iĝis laŭreato pri honora



gazetoj tiamaniere menciis la centjaran Esperanto-movadon en Pirna.

Frank Nietzsche

Peter Roether mortis

Je la 2a de februaro mortis en Michelstadt en la aĝo de 83 jaroj nia kara membro Peter Roether. Li estis pranepo de la konata Esperanto-pioniro Marie Hankel; tamen Peter Roether ne eestis denaskulo. Li lernis la internacian lingvon ĉirkaŭ la jaro 1970, kune kun sia plej aĝa filo Christof.

Poste li tre aktivis en la movado. Li estis interalie membro de GEA kaj de UEA kaj prezidanto de Romolo. En la jaro 1987 li kunfondis la Esperanto-klubon Odenwald (EKO). Peter Roether partoprenis plurajn Universalajn Kongresojn, ekzemple en Hamburgo, Pekino, Berlino, Antverpeno kaj Zagrebo, kaj nenombreblajn aliajn kongresojn. Estante instruisto, li organizis multajn Esperanto-kursojn.

Kun Peter Roether ni perdas tre karan movadanon, kiu estos eterne rememorata. Ni funebras kaj kondolencas.

*Andreas Emmerich
prezidanto de EKO*

REVELO-tago en Krefeld

Je la 6a de septembro okazos la REVELO-tago en Krefeld. Krom kutima membrokunveno estos muzik-prezento kaj festo okaze de la 100jariĝo de la Esperanto-grupo. Detala programo sekvos en venonta *Esperanto aktuell*.

Petra Dückershoff

Kiel travivi intervjuojn?

REVELO (Rejnland-Vestfalia Esperanto-Ligo) organizis en februaro seminarion rilate al la temo „Informado/publika agado“ en Essen. Gvidis ĝin d-ro Ziko van Dijk, kiu jam multe okupiĝis pri tiu temo kaj i. a. pasintjare publikigis libron pri ĝi. La ĉefa temo estis „kontakto kun ĵurnalistoj“. Multaj aktivuloj jam konas tiun situacion, kiu foje ne estas tute agrabla kaj certe ne kutima. La partoprenintoj ekzercis intervjuojn en kiuj kelkaj rolis kiel ĵurnalistoj, krome oni priparolis la varbadon ĉe informstandoj, la preparon de komunikiloj kaj artikoloj por gazetoj kaj interŝanĝis spertojn kaj opiniojn.

Petra Dückershoff